

4a DIMANĈO DE ADVENTO

JESUO NASKIĜIS EL MARIA, FIANĈINO DE JOZEFO, FILO DE DAVID.

El la evangelio laŭ Mateo 1, 18-24 (Komento de p. Alberto Maggi OSM)

Jen kiel naskiĝis Jesuo Kristo: Lia patrino Maria estis fianĉinigita al Jozefo; antaŭ ol ili kunvenis, ŝi troviĝis graveda per la Sankta Spirito. Jozefo, ŝia edzo, estante justulo ne volis kompromiti ŝin. Tial li intencis sekrete ĉesigi la gefianĉecon. Sed kiam li pripensis tion, jen anĝelo de la Sinjoro aperis al li en sonĝo, kaj diris al li: „Jozefo, filo de David, ne timu edziĝi al via fianĉino Maria: ĉar la infano, kiun ŝi atendas, estas per la Sankta Spirito. Maria naskos filon, kaj vi nomos lin Jesuo: ĉar Li savos sian popolon de ĝiaj pekoj.” Kaj tiel plenumiĝis tio, kion la Sinjoro diris per la profeto Jesaja:

*„Jen virgulino koncipos kaj naskos filon,
kaj oni donos al li la nomon Emanuelo,*

kio signifas: „Dio estas kun ni”. Kiam Jozefo vekiĝis, li faris kiel ordonis al li la anĝelo de la Sinjoro kaj akceptis sian edzinon.

La evangelio de Mateo komenciĝas per la geneologio de Jesuo. Ni legu el ĝi. *Geneologio de Jesuo Kristo filo de Davido, filo de Abram, Abram generis Isaak...* kaj tiel plu, estas tuta serio da generacioj. Por tion kompreni, ni devas penetri en la tiaman judan kulturon, eĉ adaptiĝi al la tiama juda lingvo, en kiu ne ekzistis la vorto “gepatroj”. Ekzistis unu patro, kiu generas, kaj la patrino, kies tasko estas nur naski. Al la naskiĝo de bebo patro kaj patrino ne kontribuis egale: la patrino funkciis kvazaŭ infanujo, kiu akceptis la semon de la edzo, kaj poste, post la necesa tempo, ĝin elpuŝis: do estas ĉiam viro la generanto de viro. Nu, ni legas la tutan geneologion de Jesuo, generacio post generacio, de viroj generantaj aliajn virojn, ĝis ni atingas versiklon 16: “*Jakobo...*”, la patro de Jozefo, estas la avo de Jesuo “*Jakobo generis Jozefon...*” kaj ni atendus, la kvardekan fojon, la verbon “generi” ... “*kaj Jozefo generis Jesuon* “. Kontraŭe la sekvo estas: “*Jakobo generis Jozefon, la edzon de Maria, de kiu estis generita Jesuo, nomota la Kristo*”.

Jen io nova, novaĵo nekredebla: por Maria estas uzita la sama verbo, "generi", kiun oni uzis por la genero de la viroj. Kion intencas diri Mateo? Ke kun Maria tiu tradicio, komencita en la pratempo kaj daŭrinta dum la tuta historio de Izraelo, estingiĝas kun Jozefo. Ni rimarku: la patro, generante filon, ne transdonis nur la biologian vivon, sed la tutan tradicion kaj spiritan econ de sia popolo, Nu, tiu valorega historia heredaĵo finiĝas ĉe Jozefo. Kun Jesuo estas kreado nova. Ni legu do la liturgian tekston de ĉi tiu dimanĉo:

"Jen kiel naskiĝis Jesuo Kristo..."...Mateo memorigas Genezon, la unuan libron de la Biblio, por montri, ke temas pri nova kreado, io neniam okazinta antaŭe:

"...Lia patrino Maria estis fianĉinigita al Jozefo...; (ni klarigu la geedziĝajn ceremoniojn en la epoko de Jesuo: ili estis du, kun unujara distanco inter ili. En la intertempo, la du gejunuloj estis jam geedzoj, sed ankoraŭ ne vivis kune) "...Antaŭ ol ili kunvenis... (dum tiu intertempo inter la du ceremonioj) ŝi troviĝis graveda per la Sankta Spirito." Kion intencas diri Mateo? Ni atentu ankaŭ la gramatikon: en la juda lingvo la spirito estas ingenra, en la greka lingvo ĝi estas neŭtra. Do Mateo tute ne volis aludi al mitoj, komunaj inter la paganoj, de seksaj kuniĝoj de iu dio kun iu knabino. Kio estas la Sankta Spirito? La krea forto de Dio. Tio, kio naskiĝis en Jesuo estas la sama forto, kiu ekigis la kreadon. En la libro Genezo, kiun Mateo memorigas, *"en la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron, kaj la spirito de Dio ŝvebis super la akvoj"* (Gen1, 1). Nun la Spirito de Dio ekagis denove, en tiun kreitaĵon.

"Jozefo, ŝia edzo, estante justulo (tio signifas, ke li respektas ĉiujn regulojn kaj preskribojn de la leĝo) ne volis kompromiti ŝin... per publika akuzo: ankaŭ en la unua stadio de la geedza stato la adulta edzino estis mortpunenda per ŝtonumado. Do la situacio de Jozefo estis drama, kaj tion rakontas apokrifaj evangelioj; laŭ unu el tiuj, Jozefo rezonas tiel: "se mi prisilentos ŝian eraron, mi malobeos la leĝon de la Sinjoro, kiu postulas, ke mi ŝin denuncu kaj kaŭzu ŝian mortigon, sed tion mi ne volas". Jen lia elturniĝo (Tial li intencis sekrete ĉesigi la gefianĉecon....).

"...Sed kiam li pripensis tion, jen anĝelo de la Sinjoro aperis al li en sonĝo..." ... tiu esprimo, "anĝelo de la Sinjoro" aperas nun unuafoje ĉe Mateo. Laŭ la juda kulturo, Dio estis malproksima de la homoj, kaj kiam li volis influi ilian vivon li ne montris sin persone, sed laŭ tiu formulo, kio ne signifas, ke Dio sendas anĝelon, sed ke Dio komunikas ion al la homoj. Kial per sonĝo? Tio estas menciita en la libro Nombroj: *"Se estos iu profeto, mi, Javeo, la Sinjoro, al li min montros per sonĝo kaj per sonĝo mi parolos al li.* En ĉi tiu evangelio tiu anĝelo aperos aliajn du fojojn, kaj ĉiam por la vivo. Ĉi tie Dio transdonas la vivon, la duan fojon li defendos la vivon kontraŭ Herodo, la trian fojon li konfirmos, ke la vivo venanta de Dio estas nedetruibla.

"...kaj diris al li: 'Jozefo, filo de David, ne timu edziĝi al via fianĉino Maria: ĉar la infano, kiun ŝi atendas, estas per la Sankta Spirito'."

Do Dio atestas, ke Maria ne estas adultulino: ŝi ne kokris Jozefon: en ŝi kreiĝis io nova, io kion ŝi akuŝos: *"Maria naskos filon, kaj vi nomos lin Jesuo ĉar Li savos sian popolon de ĝiaj pekoj."* Mateo kunligas la nomon Jesuo kun la savo de la pekoj, ĉar Jesuo en hebrea lingvo sonas Jeshuà, la futuro de verbo "savi", savonto, vortludo ne tradukebla. Mateo estas la sola evangeliisto kiu, parolante pri la vespera manĝo de la Sinjoro, aldonas la vortojn, ke la sango de Jesuo verŝiĝos por la pardono de la pekoj, spuroj de pasinteco malaprobata de Dio.

"Kaj tiel plenumiĝis tio, kion la Sinjoro diris per la profeto Jesaja: „Jen virgulino koncipos kaj naskos filon, kaj oni donos al li la nomon Emanuelo, kio signifas: ‚Dio estas kun ni‘ (Jes 7, 10)." Ĉi tiu estas profetaĵo al reĝo Akaz, por anonci la baldaŭan naskiĝon de lia filo, kiu estos reĝo Ĥieskija. Al tio intencis nin konduki Mateo, tio estas la temo de lia evangelio: la novaĵo de Dio iĝanta homo. Tio estas anoncita nun, ĉe la komenco, kaj tion ripetos Jesuo ĉe la fino *"Jen Mi estas kun vi ĉiujn tagojn ĝis la maturiĝo de la mond-aĝo"*. Do Dio ne plu estas io serĉinda, sed io ne malproksima, kun ni, akceptenda, por iri kun li al la homoj. Antaŭe la homaro vivis por Dio, Dio estis la celo; nun la homaro kun Jesuo vivas en Dio kaj, kun Li kaj kiel Li, portas ĉi tiun ondon da amo al ĉiu kreitaĵo.

"Kiam Jozefo vekigis, li faris kiel ordonis al li la anĝelo de la Sinjoro kaj akceptis sian edzinon". Do Jozefo estas la vera justulo, kiu ne zorgas nur pri la tradicio de la leĝoj, sed estas en agordo kun la parolo de Dio, ankaŭ kiam tiu ne respektas kutimojn kaj regulojn. Danke al tiu neglekto de la respekto de la leĝo, La Sankta Spirito enpenetras, kaj ekestas nova vivo, tiu de Jesuo.